Mutig vorwärts!‘ **Aŭstria Esperantisto** ‚Kuraĝe antaŭen‘

# Aŭstria Esperantisto

## (Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

**8a jaro. N-o 8/9** **Monata** **Aŭg.-sept. 1931**

Redaktejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Administrejo: Bisamberg, Bundesstraße 154.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ Ŝ 4.88, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25; ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

### Aus aller Welt.

**Bürgermeister und Landeshauptmann von Wien, Karl Seitz** über Esperanto anläßlich der 2. Arbeiter-Olympiade in Wien: Die Vereinigung des Proletariats aller Länder zu einer Kampf- und Zielgemeinschaft setzt das volle gegenseitige Verständnis voraus. Wenn heute das Esperanto ein wichtiges Verständigungsmittel zwischen Arbeitern verschiedener Muttersprachen geworden ist, so verdient es Beachtung wie alles, was das gegenseitige Verstehen fördert und dadurch dem internationalen Proletariat und dem Fortschritt der Menschheit dient.

(„Socialisto“.)

Ein **Lehrstuhl** für Esperanto wurde an der Universität **Leningrad** gegründet.

Der **Unterrichtsminister von Sidney** (Australien) erklärte, daß Esperanto versuchsweise auf ein Jahr in den staatlichen Schulen eingeführt werde. Er hält die Universalsprache für eine der dringendsten Notwendigkeiten im Interesse des Friedens.

**Das schwedische Parlament** hat 2900 Kronen zur Heranbildung von Berufslehrern für Esperanto bewilligt. Dieser Antrag wurde deshalb angenommen, weil die im Vorjahre abgehaltenen und ebenfalls vom Parlament subventionierten Esperantokurse für Lehrer große Erfolge zeitigten.

Die **Volkshochschule in Wiesbaden** hat in ihrem Frühjahrslehrgang wie bisher Esperanto als Unterrichtsfach aufgenommen. **Wo bleibt Wien?**

**Radjo-Centro Odessa**, Leninstr. 17, USSR, Welle 450, wird einen Kurs für Fortgeschrittene senden und die besten Schüler prämiieren. Verlangen Sie Auskünfte. Auch Esperanto-Konzerte werden nach den Wünschen der Hörer veranstaltet werden, die der Station ihre Wünsche bekanntgeben wollen. Es wird bestimmt geantwortet.

**Der Wiener Sender** hat sich, wie aus den Aeußerungen der ausländischen Besucher des Esperanto-Museums und vieler Kongreß-Besucher des Weltkongresses in Krakau zu ersehen ist, mit seiner Verkehrswerbung für Oesterreich große Sympathien erworben, und sagen wir auftragsgemäß der Ravag hiefür öffentlich Dank. Es wurde aber allgemein der Wunsch ausgesprochen, daß für dieselben wenigstens 20 Minuten in Hinkunft von der Ravag zur Verfügung gestellt werden mögen.

**Esp.-Kurse bei der Polizei** wurden abgehalten nach dem Beispiele der Wiener Polizei: **Oslo** (Norwegen) 25 Teilnehmer; **Shiga Ken** (Japan) 35, **Krefeld** und **Berlin.**

**Neues Wiener Journal** brachte einen sehr schönen Artikel über das Int. Esp.-Museum (3. Aug.) und über den Weltkongreß in Krakau; **Volks-Zeitung** bringt fortlaufend wöchentlich eine Kolonne ‚Esperanto-Rubrik‘.

**„Reichspost“**-Wien bringt in ihrer Nr. v. 4. IX. folgendes: **Esperanto — die Rettung des Tonfilms?** Wie **„Daily News“** verraten, will der Direktor der Metro-Goldwyn-Mayer-Gesellschaft, Fred Niblo, gefunden haben, daß der einzige Weg, um das Tonfilmgeschäft für Amerika zu retten, in dem Siege des Esperanto als Weltsprache liege. Man will daher zusammen mit den Esperanto-Gesellschaften eine ausgedehnte Propaganda für dieses Idiom eröffnen, damit das Filmpublikum aller Länder Esperanto lernt und dann die amerikanischen Filme überall gegeben werden können. Der Beginn dieser Propaganda soll bereits in den skandinavischen Ländern gemacht worden sein. (Der Plan klingt freilich etwas phantastisch und es ist fraglich, ob er gelingen wird. Jedes Volk wird lieber in seiner Muttersprache Tonfilme hören als in einer Weltsprache. Anmerkung d. Rp.) Die Rp. war nie sehr für Esperanto begeistert und tritt lieber für Englisch ein, obwohl dies auch nicht unsere Muttersprache ist.

# Ĉirkaŭ la XXIII-a.

## Al Federacia Prezidânto de Aŭstrio, s-ro Wilhelm Miklas, estis sendata jena letero:

Altŝatata Prezidanta Moŝto!

La respektplene subskribintaj reprezentantoj de la Esperanto-Movado havas la honoron, esprimi sian plej elkoran dankon pro la granda favoro, kiun Via Prezidanta Moŝto montris al nia grava movado.

Ege ni dankas pro la denova ŝatateco, montrita al Esperanto per la delego de la aŭstria konsulo en Krakow, s-ro Peter Wojnovich, kiel reprezentanto de Aŭstrio en nia XXIII-a.

La tuta kongresanaro estis entuziasmigita pri la belaj vortoj de rekono je niaj klopodoj, diritaj en Esperanto mem kaj tiel komprenitaj de ĉiuj ĉeestantaj nacioj.

Ni deziras ankoraŭ esprimi la tre respektplenon peton, ke Via Prezidanta Moŝto afable atentu ankoraŭ venonte niajn gravajn klopodojn, kiuj celas per enkonduko de komuna helplingvo interkompreniĝon kaj sekve repaciĝon de tutmondo.

Akceptu Via Prezidanta Moŝto niajn plej respektplenajn komplimentojn:

**Loka Kongreskomitato:** Univ. prof. d-ro Bujwid, prez., prof. Tad. Hodakowski, ĝen. sekr.
**Int. Centra Komitato** de la E.-Movado en Genève: John Merchant (Sheffield), prez., Rob. Kreuz, direkt.
**Konstanta Reprezentantaro** de la nacioj, Antwerpen: Schoofs, ĝen. sekr.
**Universala Esperanto-Asocio,** Genève: Joh. Karsch (Dresden), vicprez., Hans Jakob, direktoro
**Esperantista Lingva-Komitato kaj Akademio,** Paris: Warden (Edinburgh), prez.
**Internacia Esperanto-Muzeo,** Wien: Steiner, prez.
**Esperanto-gazetaro** (140 gazetoj): Teo Jung (Heroldo de Esperanto, Köln)
Por **familio Zamenhof:** D-ro Leono, Felix, Adam, Zofja, Lydja Zamenhof

## Prezidanto de IEMW, s-ro Steiner, ricevis de barono Löwenthal jenan leteron en germana lingvo:

La direktoro de la Oficejo
de la Federacia Prezidanto
6922

Wien, la 28. de aŭgusto 1931

Tre estimata s-ro Registara Konsilanto!

Sinjoro Federacia Prezidanto ricevis de Internacia Esperanto-Kongreso el Krakovo la 20. de aŭgusto nj. salutleteron. Laŭ ordo de Lia Moŝto mi havas la honon, transdoni al vi kiel la aŭstrian reprezentanton en ĉi tiu kongreso la plej komplezan dankon de sinjoro la Federacia Prezidanto por la al li per la afabla manifestacio farita ĝentileco kaj vin samtempe peti, ke vi afable interpretu al la aliaj kongrespartoprenintoj kaj speciale al la sur la manifestacio subskribintoj la dankon de sinjoro la Federacia Prezidanto.

Akceptu, tre estimata sinjoro Registara Konsilanto, la esprimon de la plej granda altestimo

de via sindona

Löwenthal.

**(Aliaj gazetoj afable represu ambaŭ leterojn!)**

---

Vigla vivo regis en Int. E.-Muzeo en Wien jam kelkajn tagojn antaŭ la XXIII-a. S-anoj el diversaj landoj rendevuis tie kaj sin sentis hejme.

En la **karavano,** aranĝita de IEMW, la 31. de julio partoprenis pksm. 30 personoj el 8 landoj. Ili ĝuis sufiĉan rabaton ĉe la fervojoj en Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio krom tiun en Polujo. En la rekta trajno estis rezervataj 3 kupeoj por la karavano. En Bceclava, Prerov, Bohumin ktp. venis ĉiam denove kongrespartoprenantoj kaj sepdeko alvenis la 1. aŭg. attgm. en Krakow, atendata de multnombra E.-gejunularo, kiu nin kondukis al la akceptejo.

En la atendejo en la stacidomo mi ricevis bonan loĝejon; en la kongresejo en la urbo miajn dokumentojn: kongreskarton, belan kongreslibron, belan gvidlibron tra Krakow kun bona urbplano, enirbiletojn kaj aron da presaĵoj.

Mi havis la plezuron renkonti kaj saluti multajn konatajn pionirojn de nia movado, kvankam el Germanujo pro la elvojaĝtakso nur malmultaj estis venintaj: Dir. **Kreuz** de ICK pro multokupeco preskaŭ ne havis la tempon diri al mi kelkajn malĝentilaĵojn (ni estas bonaj amikoj!); la bedaŭrindulo estis de ĉiuj flankoj atakata, ĉiu deziris ion scii, paroli en la malferma aŭ laborkunsidoj ktp.; multo pezegis sur liaj **fortaj** ŝultroj; prez. de ICK **Merchant** kun sia edzino, ĉiam kun ĉarme

ridetantaj vizaĝoj; **Joh. Karsch**, nia fervora vicprez. de UEA kun dir. **Hans Jakob**, kiu devis respondi al multnombraj delegitoj; **Teo Jung**, ĉefredakt. kaj eldon. de nia kara „Heroldo de Esperanto", kiu, kvankam novbakita edzo, venis sen edzino, ĉar lia tuta apartenis al la kongreso **(legu en Heroldo detalan kongresraporton!)**; vicprez. de Lingva Komitato, **Warden**; ĝeneralsekr. de Konstanta Reprezentantaro de la Nacioj (LR) **Schoofs**; **Leono, Felix, Adam, Zofia, kaj Lydja Zamenhof**; nia verkisto **Baghy**; prez. de IKUE prof. **Font-Giralt, ge-Isbrücker**-Haag, pastro **Ĉe, ge-Morariu, B. Long** (prez. de XXII.), mondvojaĝanto **Scherer**, prof. d-ro **Canuto** (prez. de Itala Federucio Esp.), **ge-Borel** (dir. de Radio-Lyon), **P. Christensen** el Los Angeles, prof. d-ro **Kamaryt** (prez. de Ĉeĥosl. E.-Asocio). d-ro **Pitlik, Münz, Agourtine** k. m. a. El la polaj s-anoj d-ro **Bujwid**, prez. de XXIII., **Hodakowski**, d-ro **Dreher, Fethke, Lejzerowicz, Medrkiewicz, Dratwer, Alfus** ktp.

**Malferma kunsido** en salono de Katolika Domo. Sur la podio la estraro kaj la reprezentantoj de la nacioj. **Bernard Long**, prezidinto de XXII-a en Oxford, malfermas kaj diras: „Multaj polaj ges-anoj lastjare vizitis Anglujon kaj mi ĝojas, ke nun ni povis reciproki tiun viziton. Mi deziras memorigi pri la VIII-a, kiu ankaŭ okazis en Krakovo. Mi esperas, ke la nuna kongreso estos ne malpli glora ol la tiama. Denove post 19 jaroj la popolo de Esperantujo jen venas al la lulilo de Esperanto, al la nun liberigita Polujo, al la naskiĝlando de nia Majstro. Mi deklaras la XXIII-an malfermita."

Sekvas la elektado: Honorprez. **prof. Zaleski**, rektoro de la universitato, prezidanto **prof. d-ro Bujwid**, aro da vicprez.: ĝen. sekr. **R. Kreuz, T. Hodakowski** kaj **St. Rudnicki**, sekr. **Alfus, Bilinski, Dreher.**

**Prof. Bujwid** transprenas la prezidantecon. Ĉar la malferma kunsido estis disaŭdigata per **Radio**, la prez. parolas kelkajn frazojn en pola lingvo kaj daŭrigas en Esperanto, esprimante sian ĝojon, ke malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj tamen venis tiom da gastoj, kaj petas, ke oni vizitu la urbon kaj ĉirkaŭaĵon kaj travivu belajn tagojn en Krakovo.

**Prez. Merchant** de ICK salutas speciale prez. Bujwid, fidela amiko de nia Majstro: „Lastjare ankoraŭ sidis ĉe mia dekstra flanko mia kara amiko prof. Cart; nun li mortis, kaj mortis ankaŭ alia fidelulo de nia afero, d-ro Sós (Leviĝo)." Prez. Merchant memorigas pri la iamaj gloraj tempoj de Polujo, kiam ĝi estis memstara granda nacio. „Venis mizeraj tempoj, Polujo perdis sian sendependecon, sed, malgraŭ fremdaj estroj decidis pri ilia sorto kaj estis malpermesite al poloj paroli sian lingvon, tamen ili konservis hejme sian lingvon, en siaj koroj ili pensis pole. Tial Polujo ne mortis, sed vivas kaj vivos. Ne ekzistas potenco por malliberigi la homan pensadon. Tial Polujo hodiaŭ estas libera popolo."

Li rekomendas al la registaro de ĉiu malgranda lando en Eŭropo, labori por atingi decidon pri akcepto de internacia lingvo, ĉar ĝi estos por ili sekurigilo kontraŭ la grandaj ŝtatoj. La verda standardo estu por ĉiam simbolo de libereco.

Poste li mencias polajn famulojn, inter ili Chopin. „Sed venos la tago, kiam oni rekonos tra la mondo, ke la plej granda filo de Polujo estas d-ro Zamenhof."

„Nuntempe regas multloke pesimismo, sed ni ne rajtas esti pesimistoj." Esperanto progresas konstante kaj estas hodiaŭ vivanta forto tra la mondo. „Li mencias la sukcesojn de la lasta jaro, unuavice la mondvojaĝon de s-ro **Scherer**, per kies klopodoj la verda stelo brilas tra la oriento, kaj la sukceson ĉe mondkongreso de Rotary, al kiu s-ro **Steiner** en Wien multe helpis. Fine li mencias la sukcesojn de multaj agantoj por E.: s-roj **Jungfer** (Radio), **Avril** (gazetaro), **pastro Ĉe, Steiner** (Int. E.-Muzeo), **Kreuz** k. a." Ni havu kuraĝon, paciencon kaj fidelecon. Esp. floras kaj kreskas kaj la memoro de Zamenhof vivas por ĉiam".

Post la honorigaj vortoj al s-ro **Steiner** ĉi tiu ekstaras kaj disfaldante flagon li diras: „Ĉi tiu flago la unuan fojon flirtis dum la Unua Kongreso en Boulogne en 1905 kaj nia Majstro por ĉiama memoro metis sur ĝin sian subskribon. Ges.-anoj Sergeant el Boulogne donacis la flagon al Int. Esp.-Muzeo en Wien. Mi alportis ĝin, por flirtigi ĝin en Krakovo, kie Zamenhof antaŭ 19 jaroj faris sian faman paroladon."

Sekvas salutoj de vicvojevodo d-ro Bilek, rektoro Zaleski ksj vicurbestro Klimecki. Poste salutas la reprezentantoj de la registaroj: Aŭstrio, Germanujo, Liechtenstein, Holando, Hungarujo, Norvegujo, Rumanujo kaj de la magistrato de urbo Bialystok.

**La aŭstria konsulo, s-ro Peter Wojnovich** parolis en Esperanto jenon:

Gesinjoroj!

Estante konstanta reprezentanto de Respubliko Aŭstrio en Krakovo mi ricevis la honorigan ordonon vin, elkore saluti nome de la aŭstria registaro ĉe la malfermo de XXIII-a Esp.-Mondkongreso kaj transdoni al vi la plej bonajn dezirojn por bona sukceso de viaj laboroj.

Por bonega sukceso de la aranĝoj garantias la fame konata gastamo de la miljara pola spirita centro kaj kongresurbo Krakow.

La intereso de Aŭstrio, kiu sin montris ĉiam favorante Esperanton kaj speciale en la helpo al Internacia Esperanto-Muzeo en Wien sub la protekto de nia ŝtatprezidanto, sinjoro Wilhelm Miklas, vin akompanas

ankaŭ en la muroj de la pola reĝo- kaj kronigurbo Krakow.
Vivu Esperanto!"

Granda aplaŭdo sekvis.

Parolis ankaŭ reprezentantoj de Intern. Laboroficejo en Genève, Tutmonda Cionista Organizo, skoltoj ktp. Durrant laŭtlegas leteron de Angla Societo por Ligo de Nacioj koncerne E.-on.

Prez. **Bujwid** speciale salutas la familion Zamenhof.

D-ro **Leono Zamenhof** en belega paroladо kontraŭparolas la pesimistojn.

La orkestro ludas la Tagiĝon „Agordu la la bruston, ho nia fratar' . . ."

Ĝen. sekr. **Kreuz** legas telegramojn kaj salutleterojn.

Sekvas la salutoj de la **naciaj reprezentantoj:** Aŭstrio (Steiner), Belgujo (Schoofs), Britujo (Robertson), Bulgarujo (Radev), Ĉeĥoslovakujo (Pitlik kaj Hub), Danzig (Spiess), Estonio (Brauer), Francujo (Borel), Germanujo (Münz), Hispanujo (Font Giralt), Hungarujo (Weinberger), Italujo (Canuto), Japanujo (Kawahara), Latvujo (Indra), Nederlando (Isbrücker), Rumanujo (Harabayiu), Svedujo (Dahl), Svislando (Jakob), Sudslavujo (Rabena), Usono (Scherer).

Vicprez. **Karsch** salutas nome de UEA, dirante, ke la naciaj asocioj estas la unu kolono de nia movado kaj UEA la dua.

Prez. **Bujwid** donas kelkajn klarigojn en la mikrofonon en Esp. kaj pole kaj atentigas, ke ni nepre bezonas du lingvojn, tiun de la patrolando kaj Esperanton.

Per ludado kaj kunkantado de la himno finiĝis la malferma kunsido.

## La laborkunsidoj:

Prez. **Merchant** malfermas la unuan.

S-ino **Isbrücker** salutas nome de Int. Ĉe-Instituto kaj de Esperanto-Domo en Arnhem, dankas la subtenantojn kaj invitas al aparta kunveno.

Ukraino prof. **Kuzjma** faris jenan plendon: „Ni ukrainaj kongresanoj protestas kontraŭ tio, ke Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj malpermesis al s-ro prof. O. Kuzjma, prez. de Societo de Ukrainaj Esperantistoj „Progreso", saluti la XXIII. en la nomo de la ukrainaj esperantistoj, motivante, ke la Ukrainoj ne formas nun sendependan ŝtaton. Samtempe oni allasas la germanojn el Ĉeĥoslovakujo saluti la kongreson, malgraŭ ke ili ankaŭ ne formas ian duan sendependan germanan ŝtaton. Ni rimarkas ankaŭ, ke antaŭ mondmilito Polujo ne ekzistis sur geografia karto de Eŭropo kiel sendependa ŝtato, kaj malgraŭ tio pola nacio vivis kaj poloj ne nur salutis Esp.-Kongreson kiel poloj — ne aŭstrianoj, sed eĉ gastigis VIII. en 1912. Kaj dum ĉi tiu kongreso reprezentanto de Ukrainoj, s-ro H. Jakimchuk el Lvovo, salutis la kongreson en la nomo de ukrainoj. Malpermesinte al ni saluti la kongreson en la nomo de ukrainaj esp.-istoj, la estraro de la kongreso faris ion tute kontraŭan al la ideon de l' esperantismo. Pro tio ni ukrainaj esp.-istoj per tio ĉi protestas kaj forlasas la XXXIII. Prof. Kuzjma, T. Skotynskyj, I. Cherkavskyj. (Tiu protesto aperis en du ukrainaj tagĵurnaloj).

S-roj **Kreuz** kaj **Bujwid** klarigas, ke salutas **ne nacioj** sed **nur reprezentantoj** de **naciaj E.-organizoj.**

**P. Font Giralt** nome de Int. Katolika Unuiĝo Esp. (IKUE) diras, ke IKUE deziras kunlabori kun la ĝenerala movado.

**Bujwid** parolas pri klopodoj koncerne Radion kaj poŝtmarkojn.

S-ino **Böttcher** invitas post la kongreso veni al Reinerz por ĉeesti la inaŭguron de Zamenhof-munumento.

Ĝen. sekr. de KR **Schoofs** raportas pri la kotizoj de la nacioj kaj petas, ke oni laboru en la naciaj societoj laŭorde kaj pagu ĝustatempe la kotizojn.

Prof. **Kameryt** plendas, ke la naciaj societoj ofte ne respondas.

**Merchant** proponas, sendi telegramon al prezidanto de Polujo.

**Karsch** invitas al kunsido de UEA.

**Steiner** raportas pri IEMW, ĝia historio kaj nuna stato. La biblioteko enhavas post ricevo de la Biblioteko Cart pli ol 5000 librojn ktp. Li petas, ke oni subtenu la aferon, kiu nun oficiale estas subtenata de ICK. (Granda aplaŭdo).

**Fethke** (Jean Forge) parolas pri „Propagando de Esp. per filmo". Ni bezonas amaspropagandon, kiun ni povas atingi nur per filmo, ĉar ĝi estas pli potenca ol la gazetaro kaj Radio. Ni devas zorgi, ke la ĉiusemajnaj filmaj aktualaĵoj uzu Esp.-on, ĉar 200 milionoj da homoj aŭskultas semajne la „Aktualan Semajnon". La filmkompanioj ne estas kontraŭ Esp. Li proponas starigi komitaton por Paris, por ke la kongreso tie estu filmota.

**Ŝapiro** atentigas pri Postkongreso en Bialystok kaj invitas al multnombra partopreno.

**Morariu** parolas pri 3 steloj de la Esp.-movado Baghy, Jung, Ĉe, kaj proponas elekti ilin Honoraj vicprezidantoj.

**Bujwid** invitas al vizito de Somera Universitato.

Prez. **Merchant** fermas la kunsidon.

## Dua Laborkunsido:

Parolado de **Avril**, prez. de Gazetara Komisiono de ICK, pri „gazetara propagando, ĝia utilo kaj organizo" ne okazis, ĉar Avril ne povis ĉeesti la kongreson. Anstataŭante parolis **Ŝapiro** pri siaj propraj spertoj en la gazetara propagando kaj donis konsilojn.

**Teo Jung,** ĉefredakt. de Heroldo de Esperanto, parolas pri „centrigo de la gazetara informado pri E.", akcentante, ke informado estas despli efika ju pli ĝi estas rapida, fidinda, kompleta kaj tamen konciza.

**J. Karsch** pri „vojoj kaj metodoj de apliko de E. por turisma reklamo“ mencias la jam atingitajn rezultojn kaj montris eblecojn por la estonto.

Poste ekestas kortuŝa momento, kiam estas disaŭdigita la sola ekzistanta disko kun la voĉo de nia majstro, bedaŭrinde ne tute sukcesinta pro egaj teknikaj malfacilaĵoj.

## Tria Laborkunsido:

**Brauer** parolas pri ŝlosiloj, korespondado ktp.

**Merchant** sciigas, ke s-ro Warden estas elektita kiel nova prezidanto de Esperantista Akademio (Aplaŭdo).

**Prez. Warden** raportas pri Lingva Komitato (LK) kaj Akademio. Li diras, ke la presita raporto estis la lasta laboro de prof. Cart. Koncerne prononcadon de E. li citas la konsilon de d-ro Zamenhof pri mezlonga kaj mezlarĝa prononcado de vokaloj, opinias, ke poloj plej bone prononcas E.-on kaj rekomendas la broŝuron de Krysta.

**Gefland** la trian fojon parolas pri sia projekto koncerne sonfilmon.

**Kreuz** pri „Kiel propagandi pli efike?“ kaj „Ĉu Esp. progresas?“ diras, ke komparante la nunan staton kun la antaŭa la progreso estas mirinda. Ekzistas diversaj manieroj de propagando, sed certe ĝi ne estu teda sed interesa. Bona maniero enpenetrigi E.-on estas la „Per-Esperanto-servo“. Oni nur laboru serioze, racie kaj por trovi la ĝustan vojon, ne agu en iu ajn kampo sen sufiĉa preparo, sen profunda studado. — La demandon „Ĉu E. progresas?“ ĉefe esp.-istoj faras mem. Ni ĉiuj devas ĝoji pri la nuna stato de rekono en la publiko. Centoj, miloj laboras nun senĉese por la sukceso de nia afero. E. progresas, ni sukcesas.

**Schoofs** fine legas raporton de d-ro Höke, kiu ne povis veni, pri „E. kaj stenografio“.

## Ferma Kunsido:

**Indra** proponas, ke la kongreso deklaru la 2-an de junio — dato de la apero de E. — kiel tagon speciale por la propagando de Esp. (Per aklamo akceptita).

**ICK dekoris per ora medalo s-ron prof. Christaller, E.-Instituton por la Germana Respubliko kaj la familion Zamenhof.** (Pli frue medaloj jam estis donitaj al s-roj Sebert, Cart, Warden kaj Privat).

**Schoofs** insistas, ke la naciaj societoj kaj UEA harmonie kunlaboru.

**Bujwid** dankas al ĉiuj.

**Merchant** speciale dankas al direkt. **Kreuz** pro liaj grandaj meritoj, Kreuz emocie dankas.

**Merchant** fermas la kongreson.

**Diservoj: En preĝejo Sa. Mario estis katolika meso, celebrata de P. Ĉe kun E.-lingva prediko de P. d-ro Kukulka; protestanta diservo estis kun prediko de P. Hoppe.**

**Zamenhofstrato:** Post la diservo antaŭ la monumento de pola poeto Mickiewicz ariĝis la kongresanaro por komuna irado al ulica Niecala, bela strato meze en la urbo, kiu laŭ decido de komunumo Kraków de nun estu nomata „Ulica Dra Ludwika Zamenhofa“. Vicprezidanto de la urbo d-ro Klimecki per belaj vortoj faris festparoladon, kiun d-ro Bujwid tradukis E.-lingven. Poste estis senvaluigata memortabulo kun jena enhavo: „Na Pamiatke swiatwego zjazdu esperantystow, Rada m. Krakowa uczcila tworce esperanta, oznaczajac te ulice Jego nazwiskiem. Sierpien, 1931.“ E.-lingve: „Por la memoro de l' tutmonda kongreso de esperantistoj la Konsilantaro de l' urbo Krakovo honoris la aŭtoron de Esperanto, signante ĉi tiun straton per Lia nomo. Aŭgusto 1931.“

Inter la **aranĝoj** ni citu: Festivalon sur kastelo Wawel; Oratoran konkurson dum ekskurso al Lasek Wolski (la premiojn gajnis: 1. P. Font-Giralt, 2. Tiberiu Morariu, 3. Jan Jarecki); Ekskurson al Wieliczka; Kostumbalon kun naciaj kostumoj; Literaturan Matenon, kiun partoprenis Rosmarynowski, Jean Forge (Fethke), Lidja Zamenhof, Coleman, Baghy, Sturmer, Teo Jung, Scherer. Pastro Ĉe, Font Giralt, Morariu. El ili ĉiu prezentis mallongan rakonton, poemon aŭ similan kaj tio pli plaĉis ol longaj enuigaj prelegoj aŭ diskutoj pri iu ajn afero.

**Kunvenoj:** Okazis kunvenoj de KR (reprez. Steiner por Aŭstrio); UEA, bone vizitata, en kiu Steiner laŭ speciala invito de vicprez. Karsch faris raporton pri „Vojoj por enkonduko de Esp. ĉe oficialaj rondoj en la servo de fremdulfrekvento kaj faritaj spertoj“; TEKA (prezido d-roj Robin kaj Blasberg), ISAE (sciencistoj), TAGE (instruistoj), ILEPTO (poŝtistoj), UDEV (virinoj), IKUE (katolikoj), Ĉe-Instituto (s-ino Isbrükker), paneŭropanoj, bahaanoj, oomotanoj, internacianoj, blinduloj, nefumantoj, studentoj, stenografistoj, farmaciistoj, Radio ktp.

# XXIV. Univ. Kongreso de E.

Paris, 30. VII.—6. VIII. 1932.

Ĉiu esperantisto havas la deziron ĉeesti almenaŭ unufoje internacian kongreson. Certe la plejmultnombre vizitota estos tiu en Paris venontjare.

Same kiel ni aranĝis karavanon al Krakow, kiun partoprenis 30 personoj el diversaj landoj kaj ĝuis bonan rabaton sur la fervojoj, ni intencas ankaŭ aranĝi karavanon al Paris, kiun certe partoprenos la s-anoj el Polujo, Jugoslavujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Rumanujo, Bulgarujo, Grekujo ktp.

Ni ricevos rabaton sur la fervojoj aŭstria kaj germana krom tiu sur la francaj. Por la aŭstriaj partoprenontoj ni proponas, ke ili jam nun ŝparu kaj sendu al ni pomonate 25 S. Ni deponos la monon en Oesterr.

Sparkassa kaj la enpagintoj ricevos la procentojn alkalkulataj.

La restado en Paris povos esti farata tre malmultekosta, kiel jam diris al ni s-ro Warnier el Paris okaze de sia restado en Wien.

Mendu aliĝilojn de ni kaj anoncu vin al ni. Mi mem havas jam n-ron 101.

IEMW., Steiner.

## Lingva Komitato kaj ĝia Akademio.

Vicprezidanto John Mabon Warden, Edinburg, estis elektata prezidanto. Ni elkore gratulas nian Honoran Membron. IEMW: Steiner.

## Honorigo.

Elkoran gratulon al Prof. Christaller, E.-Instituto por la germana Respubliko kaj familio Zamenhof, kiuj estis dekorataj. per ora medalo de ICK.

IEMW: Steiner.

## Int. Esperanto Muzeo en Wien

**Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.**
**Telefono n-ro R 27-803**

**Malfermata** labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h kaj **2. aŭgusto** 9—$^1/_2$ 12 h.

### Cirkulero 82 de ICK.-Ĝenève.

al ĉiuj Naciaj societoj,
„ „ Reprezentantoj en K. R.,
„ „ Estraranoj de UEA.,
porinforme
al la patronaro de ICK,
„ „ Esp.-redakcioj.

Genève, 30. junio 1931.
Nova adr.: 11 rue de Mt. Blanc.

Tre estimataj samideanoj,

**Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno.**

Jam en nia cirkulero n-ro 75 (30. jan. 1931) ni alvokis por helpo al la „Internacia Esperanto-Muzeo" en Vieno. Laŭ specila peto de la Sekcia Ĉefo de l' Konfederacia Kanceliera Oficejo de Aŭstrio (Vieno), kies apartan protekton ĝuas la Muzeo, ni ankoraŭfoje turnas nin al ĉiuj ricevantoj de niaj cirkuleroj por altiri ilian atenton al la laboro de la Muzeo.

Kiel ni jam sciigis, la Muzeo estas ŝtata entrepreno kaj sekcio de la granda Nacia Biblioteko. Ĉi tiu disponigas al la Muzeo ĉion, kio estas necesa por teknika bezono. Por certigi daŭrigon kaj organizon de la Muzeo laŭ bezono de la E.-Movado aparta Garantia Kapitalo estas kolektata. El ĝiaj rentumoj estos pagataj eventualaj oficistoj (sendependaj de ŝtata interveno), afranko, presaĵoj, ktp. Pri la uzo de l' rentumoj gardas kontrolkomitato, konsistanta el 5 personoj, kiuj ne apartenas al la unuiĝo „Internacia Esperanto-Muzeo", sed inter kiuj laŭ la regularo ĉiukaze estas la prezidanto de la ICK. Tiamaniere la muzeo estas daŭre ligita kun la oficiala Esp.-Movado.

Ni do povas senhezite rekomendi subtenon de la muzeo al ĉiuj esperantistoj. Ni speciale rekomendas laŭpove akceli la muzeon per aliĝo kiel dumviva aŭ subtenanta membro per pago de respektiva kotizo. Neniu nacio devus manki en la listo de aliĝintoj, pri kiu ankaŭ tre vigle interesiĝas la oficialaj aŭtoritatoj en Aŭstrio, kiuj konstante zorgas pri la entrepreno.

Por detaloj oni sin turnu al Int. Esperanto-Muzeo, Wien, Neue Burg.

Vizitantoj de Vieno ne preterlasu la eblecon mem vidi la imponan ejon de la muzeo.

**Novaj membroj:**

**Int. Kuratora Komitato:**

**Esperantujo:**

V. N. Devjatnin, Kiev, Ukrainio
Felix Zamenhof, Warszawa

**Internacia Kuratora Komitato:**

**Alĝerio:**

Alfred Rivier, ĉefinspektoro, Alĝerio

**Nederlando:**

Julia Isbrücker, Haag

Alvenis la biblioteko de nia kara honora membro **prof. Cart,** kiun la vidvino afable sendis al ni, ampleksante **1340 librojn** kaj broŝurojn kaj multajn gazetojn. Per ĉi tiu biblioteko nia kolekto altiĝis je **pli ol 5000 libroj.** S-ino Cart demandis familion Zamenhof, ĉu ŝi sendu la leterojn de nia kara Majstro al la familio aŭ ankaŭ dediĉu al la muzeo. Kiel **Lidja Zamenhof** diris al la prez. de IEMW, ŝi estis skribinta al s-ino Cart, ke la **familio deziras, ke la leteroj estu en la Muzeo.** Koran dankon en la nomo de la E.-movado.

**Dumvivaj membroj de IEMW** (S 15.— en 3 partpagoj, postulu ĉekojn!: **Por alilandanoj sv. fr. 12·—):**

223. Glocknitzer Mary, Wien; 224. Reiter Franz, Niklasdorf; 225. Ryba Astrid, lerneja vicinsp.; 226. Jorgensen Anna, Kobenhavn; 227. Fellerer Julius, Wien; 228 k. 229. Laukes Ludw., komun. sekr., kaj edzino Maria, Lend; 230 k. 231. Dinslage J. F. k. edz. Klara, München; 232. Azorin Francisco, deputito k. arkitekto, Cordoba, Hisp.; 233. Selzer Bernh., Wien; 234. k. 235. Borel Emile, staciestro de Radio, k. edz. Marie, Lyon; 236. Saget George, ĥemiisto, Elbeuf, Franc.; 237. D-ro Döhler Walter, studkonsil., Riesa, Saksujo; 238. Rotkviĉ Ivo; 239. Novaĉiĉ Dada; 240. Lapenna Ivo, Zagreb; 241. Rotondo Giov., kanoniko k. prof., Bari, Ital.; 242. Tiefenbacher Poldi, Wien; 243. Arabeno Michele, prof., Genova; 244. Meazzi Paolo, Milano; 245. Rivier Alf., ĉefinsp. de laboristaro, Alĝerio, Afriko; 246. Prof. d-ro Canuto George, Torino; 247. Bigaj Stef., instr., Czechowice-Dziedzice, Polujo; 248. Ŝapiro Anna, Warszawa; 249. Grodzki Marjan, Deblin, Pol.; 250. Wooding Noel, Leicester, Brit.; 251. Ahnfeld Fritiof, Torskors, Sved.; 252. Moxon Gladys St., Leigh-on-Sea, Brit.; 253. Weiler Leonja, Lwów, Pol.;

254. Kolodziej Emil, Krolewska Huta; 255. Rozmarynowski Henryk, Warszawa; 256. Neubergova Julia, Krakow; 257. Long Bernard, Berkhamsted, Brit.; 258. Kudela Anton, ĵuĝa ofic., Olomouc, CSR.; 259. Thorsten Torbjär, Göteborg, Sved.; 260. D-rino Muskatblat Paula, Warszawa; 261. Furmanik Adam, pastro mariavita kaj 262. Kon Salomon, Plock, Pol.; 263. Robertson Robert, London; 264. s-ino M. Tiard, Paris; 265. d-ro Kauahara Jikichero, univ. prof. kaj direkt. de Japana E.-Instituto, Tokio; 266. Czelicka Eugenia, Lodz; 267. Sviestinŝ F, Kazdanga, Latvio; 268. Berman Oskar, red, Warszawa; 269. Karsch Johannes, vicprez de UEA, Dresden; 270. Lange Henrietta A., Haag, Ndl.; 271. Kleinberger Marie, Budapest; 272. Karat Fr., fervoj., Knittelfeld; 273. Pestinger Wilhelm, Frankfurt aM.; 274. Tichawski Jan, ferv. of. k. eld., Katowice; 275. prof. Resport, Stryj, Pol.; 276. Liberda Joh., instr., Trinec; 277. Szwiertnia Jan, mineja ofic., Raj, Silezio, CSR; 278. Glizenstein Jakob, Lodz; 279. Spiess Gerda, Danzig; 280. Mag. Taussig Alexander, Wien; 281. Bloch R., minist. ofic., Praha-Smichov; 282. Dupuis M. D., Paris; 283. d-ro prof. Philippet, Paris; 284. Klapita Gyula, Bratislava; 285. Pirchan Paula, del. de UEA, Waidhofen aTh; 286. Hauben Fritz, Cernauti, Ruman.; 287. Adamek Karl, lernejestro, Zablati; 288. Kermel Alfons, fabrikmajstro, Neu-Oderberg, CSR; 289. Kennedy David, Glasgov, Skotlando; 290. Nörholm Knut, Kobenhavn; 291. Sieber Fr, Freiwaldau, CSR.; 292. Zimmels Leon, univ-ano, Danzig; 293. eksministro Sievers Hans, Braunschweig; 294. Byleveld, W. J., ĵurnal., Leiden, Nederl.; 295. Jeleniĉ Jernej, del. de UEA, Ljubljana, SHS; 296. Ŝapiro Jakob, ĵurnal. k. iniciinto de Zamenhof-Monumento, Bialystok; 297. Tandler Wilh., Jägerndorf, CSR; 298. Huber Hans, instr., Kl. Mürbisch; 299. Borjan Budislav, inĝ., Orginmost-Sávska ban, SHS; 300. prof. Jung Ed., Strasbourg; 301 univ. prof d-ro Suzuki Masao, Tiba, Jap.; 302. Fomison S. H., instr., South Shields, Brit.; 303. Cech Raimund, Wien; 304. Mair Albert, lern. dir., Innsbruck.

**Membroj por dekjara membreco:**
13. E.-grupo Lend, Salzburg.
**Sekvu la aliaj!**

## „100.000 S Garantia Kapitalo."

| | | |
|---|---|---|
| Jam publikigigitaj | | S 831.50 |
| ge-Yelland, Aspremont | „ | 6.— |
| Rotondo-Bar | „ | 2.50 |
| München | „ | 1.— |
| D-ro Dietl, Baden | „ | 15.— |
| uarto de la kotizoj | „ | 92.50 |
| entute | | S 948.50 |

IEMW: Steiner.

**Ĵus aperis: „La vojo retourne"** de Remarque, bindite Rm. 8.50, broŝ. 6.— plus 10% sendkostoj.
**Jarmiloj pasas"**, dua volumo.

## Grava ŝanĝo!

La Centra Sidejo de la E.-Movado ŝanĝis de 1. julio sian oficejon, kies adreso ne plu estas identa kun jena de Centra Oficejo de UEA (Tour de l'Ile).

La nova adreso estas:

**Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado**
11, rue du Mont-Blanc
Genève.

**La telegramadreso:** Esperantocentro (unu vorto).

La nova oficejo troviĝas en centra strato de Genevo kaj estas facile atingebla el ĉiuj direktoj: 3 min. de la stacidomo, 5 min. de la ŝipħaltejo vid-al-vide de Centra Poŝt-Oficejo.

ICK invitas ĉiujn samideanojn fari mallongan viziton al la oficejo La direktoro de ICK plezure bonvenigos ilin!

Monsendojn oni sendu al poŝtĉeka konto en Svislando:
I. 4021 Genève
Internacia Centra Komitato
de la Esperanto-Movado.

**Zamenhof-Monumento.**

Post XXIII-a okazis en Bialystok la solena metado de la unua ŝtono al Zamenhof-Monumento. La iniciinto kaj prez. de la komitato, nia pioniro Ŝapiro en Bialystok sendis al IEMW la peton, inviti la s-anaron al monhelpo, kiu povas esti: pago de brikoj, haveblaj de IEMW, po duonŝilingo, kaj pli altaj monoferoj, por kiuj vi ricevos de IEMW specialajn deklarojn kun kvitanco.

Komencis la kolekton: Smital kaj Steiner po Zl, 10.—. IEMW: Steiner.

## Prelegvojaĝo tra Aŭstrio de Scherer el Los Angeles,

speciala delegito de ICK-Genève

Scherer prelegos en: Wien 15 kaj 16. nov., Krems 17., Linz 18., Steyr 19., Wels 20, Salzburg 21., Loko ne ankoraŭ certa la 22., Innsbruck 23., Villach 24., Klagenfurt 25. kaj Graz 26. nov.

Jam nun ni invitas la grupojn en la menciitaj lokoj, pripensi la specialan aranĝon por sia grupo, kiu nepre devos okazi la saman tagon kiel la parolado, do plejkonvena post ĝi, ankaŭ se fariĝos iomete malfrua horo. Escepte Winn, kie Laborkomitato de Vienaj E.-societoj aranĝos specialan Scherer-Vesperon. La paroladoj plejparte okazos je la 20-a h. — Sekvos precizaj klarigoj. — S-ro Scherer parolos ankaŭ ĉe Radio-Wien dimanĉe, la 15. nov., pri „La sekretoj de Valo de l' mortintoj". La precizan tempon vidu en la Radio-ĵurnaloj.

K. Wannek, prez.

**„Vizitu Budapeston"** heißt der 8-seitige illustr. Faltprospekt, den das hauptstädtische Fremdenverkehrs-Büro in Budapest in Esp. in 20.000 Exemplaren erscheinen ließ.

## Esperanto-domo en Arnhem.

La 11. aŭg. okazis la solena malfermo de Esperanto-Domo, disponigita de Arnhem-a urbestraro al Int. Ĉe-Instituto de Esperanto, por tie krei kulturan centron helpe de la internacia lingvo.

La urbo ornamigis la tramojn per verdaj E.-flagoj kaj afiŝis E.-surskribojn en ili.

Sub la prezido de s-ino Julie Isbrücker, insp. Omloo, reprezentanto de Ministro por instruado, kaj s-ro Geraedts, en la nomo de Ministro por Komerco kaj Laboro, faris paroladojn, kiuj montris larĝan komprenon de la kultura kaj praktika valoro de Esp.

Urbestro de Arnhem de Monchy surprizis per paroladeto en Esp. Ĉiujn respondis pastro Ĉe en elokventa parolado, konstatis la gravecon de la momento, kiam esperantistoj ricevis oficialan videblan helpon de aŭtoritatoj kaj alvokis al plua diligenta laboro, por ke Esp. portu tiujn fruktojn, kiujn la homaro rajtas postuli de ĝi.

Prof. Casimir, rektoro de 4. Int. Kurso de Esp. varme pledis por la paca rolo de Esp. en la historio de la homaro; d-ro Baart de la Faille, del. de UEA., gratulis nome de sia asocio; inĝ. Isbrücker bondeziris nome de ICK kaj ĝia Akademio; Heilker transdonis donacon de Esp. Ekzamena Komitato por Nederlando.

La samtempe malfermitan Ĉe-kurson partoprenas 56 personoj el 10 landoj.

## INTERVJUO

### de prezidanto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), profesoro P. J. Font Giralt el Gerona ĉe Barcelona, flanke de registara konsilanto Hugo Steiner, prezidanto de Int. Esperanto-Muzeo en Wien, en Radio-Wien, la 24. de julio 1931, je la 19h 15.

**(Mi sukcesis aranĝi ĉi tiun intervjuon, kiu certe multe propagandis. La tradukon germanlingvan faris s-ro Smital.)**

**Steiner: Radio-Wien jam aranĝis kelkajn intervjuojn antaŭ la mikrofono. Sed certe ne ankoraŭ similan kiel hodiaŭ. — Travojaĝante Wien-on la prezidanto de IKUE venis ĉi tien, por respondi al ni kelkajn ĝenerale interesajn demandojn. Prof. Font Giralt el Barcelona parolas katalune, hispane, itale kaj latine, do kvar lingvojn. Kvankam mi mem sufiĉe bone scipovas germane, angle, france kaj ĉeĥe, do pluajn kvar lingvojn, ni tamen ĉi tie antaŭ vi povas uzi neniun el tiuj ĉi ok lingvoj, ĉar mankas al ni komuna. Nia sola helpo restas tial la mondhelplingvo Esperanto.**

**Mi elkore vin salutas, s-ro prezidanto, kaj esprimas mian ĝojon, ke via unua vojo en Wien kondukis al Int. Esperanto-Muzeo.**

**Font Giralt**: Estis nur mia devo, viziti nian muzeon, kiu estas tiom grava por la esperantistoj en la tuta mondo, kvazaŭ ilia Mekka, kiel diris via respublika prezidanto ĉe la inaŭguro.

**St.**: Kial vi venis al Wien?

**Gi.**: Travojaĝante al la Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo mi ne volis preterlasi, viziti la Wien-ajn membrojn de IKUE.

**St.**: Kiel statas via movado, s-ro prezidanto?

**Gi.**: Mi dankas kontentige, ni restarigas en la tutmondo malnovajn grupojn, novaj ekestas. Ekzemple la nederlandanoj solaj nombras pli ol 1000 en sia ligo. En lasta tempo ni speciale atingis tre valoran apogon de kelkaj episkopoj.

**St.**: Ĉu vi permesas demandi de kiuj?

**Gi.**: Oh, kial ne. Estas la episkopaj moŝtoj Scheiwiler de St. Gallen en Svislando, Curi en Bari (Italujo), Domenico en Chelm (Polujo). Cetere ja ankaŭ via kardinala moŝto d-ro Piffl sin esprimis tre favore pri Esperanto.

**St.**: Kiam vi havis okazon, paroli kun lia eminenca moŝto?

**Gi.**: Mi havis la honoron, konatiĝi kun li la pasintan jaron en Budapeŝto ĉe nia katolika Esperanto-Kongreso.

**St.**: Tie vi certe ja ankaŭ parolis kun aliaj eminentuloj pri Esp.

**Gi.**: Jes, ne nur li sed ankaŭ la papa legato ĉe Emeriko-festo, la hungara princprimato Seredy, eksĉefministro Huszar k. a. sin montris favoraj al niaj klopodoj.

**St.**: Ĉu vi jam scias, kie okazos via venonta kongreso?

**Gi.**: Ekzistas propono okazigi ĝin aŭ antaŭ aŭ post la Universala de Parizo en Lisieux aŭ Lourdes.

**St.**: Niajn aŭskultantojn certe interesos, en kiuj interrilatoj via Unio estas kun la ĝenerala Esperanto-movado.

**Gi.**: Nia agado celas ja utiligi la internacian helplingvon por katolikaj interesoj. Sed, se pruvo por bonaj interrilatoj estas necesa, oni tian certe povas konsideri, ke mi estas aparte invitita en mia prezidanta rolo al la Universala Kongreso de Internacia Centra Komitato. Ankaŭ la jarlibro de UEA pruvas, ke multaj niaj membroj estas delegitoj de tiu grava tutmonda organizaĵo.

**St.**: Ĉu la reĝimŝanĝo en Hispanujo malutilis la Esp.-movadon tie?

**Gi.: Mi devas aserti la malon. Antaŭe ekzistis sub la diktatoreco malhelpoj, oni eĉ emis kelkfoje persekuti esperantistojn, ĉar ili ankaŭ uzis la internacian lingvon por naciaj celoj, kiel ekzemple ni katalunoj. Ni uzis ankaŭ E.-on por konatigi al tutmondo nian antologion. Tre grava verko, kiu en sia unua eldono jam elĉerpiĝis kaj nun devis esti eldonata en dua eldono en 1000 ekzempleroj. — Ĉu vi memoras la eksplodon de la hispana ribelo en Jaca (elp**

Ĥaka)? Tiam la konata E.-pioniro kolonelo Mangada estis komandanto de la trupoj tie kaj oni arestis lin, ĉar li demokrate vizitis la arestistojn.

St.: Oh jes, li skribis ankaŭ al mi karton el la malliberejo.

St.: Vi, s-ro prez., venas el la lando de la Floraj Ludoj. Ĉu vi ne bonvolus klarigi al ni ties esencon?

Gi.: Volonte. Antikva kutimo el la 13-a jarcento ĝis nun estas kulturata en Katalunujo. Tiam la provencanaj trubaduroj en belaj poemoj prikantis siajn amatinojn. Kaj en la unua semajno de majo okazis konkurso. La venkinto ricevis „naturan floron", kiun li publike donacis al sia amatino, kiu tiel fariĝis „Reĝino de Floraj Ludoj". Ĉi tiu antikva kutimo jam de jaroj estas kulturata ankaŭ pere de la esperantistoj kaj mi mem prezidis la lastjarajn „Florajn Ludojn".

St.: Tre interese. Nun bonvolu diri al mi, de kiam vi estas esperantisto?

Gi.: Kiam okazis en septembro 1909 la Kvina Universala en Barcelona mi estis naŭjara knabo. Mia patro kune kun mi lernis la lingvon en kelkaj semajnoj antaŭe. Ĉiam kun fiero mi memoros la momenton, kiam mi estis prezentata al Majstro Zamenhof.

St.: S-ro profesoro, vi vidis multajn urbojn jam okaze de viaj vojaĝoj. Ĉu vi jam antaŭe ankaŭ estis en Wien?

Gi.: Jam antaŭ du jaroj mi trapasis ĝin veturante al Praha.

St.: Ĉu vi rimarkis diferencon inter tiam kaj nun?

Gi.: Nu sincere dirate: Antaŭ du jaroj via urbo, ŝatata en tutmondo kiel centro de antikva kulturo kun siaj belegaj palacoj kaj muzeoj, kun sia raviga ĉirkaŭaĵo, ŝajnis al mi iom senviva. Sed nun multa vivo regas sur la stratoj.

St.: Tiun viglan frekventon kaŭzas la multnombra gastaro ĉe Dua Laborista Olimpiado, inter kiu troviĝas ankaŭ multaj esperantistoj. Sed nia lando multe suferas pro la ekonomiaj cirkonstancoj.

Gi.: Despli mi ĝojas, ke Vienno, la Parizo de Mezeŭropo, malgraŭ la suferoj je la krizo tuteŭropa neniom perdis de sia sereniga ĉarmo al fremdulo.

St.: Nu, s-ro prez., mi tre dankas pro viaj rekonemaj vortoj pri Wien kaj havas nur unu peton je la fino: Ne forgesu nin hejmenveninte kaj speciale ne forgesu IEMW!

Gi.: Estu konvinkite, s-ro Steiner, ke mi ne nur zorgos havigi al la Muzeo la kompletan katolikan Esperanto-materialon, sed uzos ankaŭ nian modestan influon: por anigi niajn membrojn en tutmondo al IEMW.

St.: Koran dankon!

Gi.: Koran dankon s-roj Steiner kaj Smital.

Permesu, ke mi ĉi tie publike esprimu mian dankon al la sendstacio „Radio-Wien" pro ĝia afableco kaj preteco, aranĝi ĉi tiun E.-intervjuon. La programestro devis klopodi en la lasta momento (tagon antaŭe) enŝovi nian aranĝon en la programon kaj forstreki de du aliaj prelegantoj la tempon, kiun ni bezonis por nia programo. Krome la E.-intervjuo estis trifoje anoncita de la anoncanto. Pro la germana traduko ĝi certe interesigis multajn neesperantistajn aŭskultantojn kaj per tio plenumis la deziritan efikon.

Ĉiuj tagĵurnaloj en Wien raportis pri la okazonta aranĝo kaj redaktoro de „Reichspost", ĉeforgano de la kristan-sociala partio, sendis redaktoron al la Muzeo pro intervjuo. La sekvintan tagon aperis en „Reichspost" longa artikolo pri la intervjuo kaj la muzeo. Ĝis nun ĉi tiu granda ĵurnalo ne estis tro favora al Esperanto. Steiner.

## E. ĉe 2. Laborista Olimpiado - Wien 1931.

Loka Komitato de 2. Olimpiado same kiel tiu de 1-a en Frankfurt a. M. plej vaste uzis E.-on kaj la servojn de la laborista E.-organizo por varbado kaj disvastigo de siaj aranĝoj.

Ĉiuj publikaĵoj havis E.-tekston; garantiglumarkoj estis eldonitaj E.-lingve kaj la ilustrita faldprospekto enhavis krom german-, franc- kaj ĉeĥlingvan tekstojn ankaŭ tiun en Esperanto.

En la oficiala raporto pri la vintra kaj la nuna Olimpiadoj estis ankaŭ salutartikoloj en Esperanto.

En ĉiuj stacioj deĵoris ges-anoj de ALLE-gruparo Wien, kie estis aranĝitaj E.-informejoj por la alvenintaj spor-samideanoj. (Dum la V. SAT-Kongreso s-ro Steiner sukcesis havigi al la laboristaj samideanoj la akcepteblon en ĉiuj Wien-aj stacidomoj. Red.)

Spite la tutmonda ekonomia krizo pli ol 80.000 laborist-gesportistoj partoprenis la olimpiadon, kiu okazis en la nova stadiono. La solena inaŭguro de ĉi tiu plej moderna, giganta sportejo, kiu havas lokon por 60.000 personoj kaj estis konstruata por la Wien-a junularo de la progresema Wien-a urbestraro en Prater, okazis la 11. julio en ĉeesto de aŭstria federacia prezidanto Wilhelm Miklas, urbestro Seitz kaj multaj aliaj.

La estraro de ALLE-gruparo Wien aranĝis je honoro de la gastoj la 24 julio salutvesperon en la sindikata domo. En la belege ornamita salonego ariĝis pli ol 300 ges-anoj. W. Rentmeister salutis nome de la aranĝintoj; tramista ĥoro kantis E.-lingve la Internacion; red. Kanitz salutis nome de la centra organo de laborista partio aŭstria „Arbeiter-Zeitung" (la paroladon esp.-igis Fr. Jonas), kvarteto ludis E.-marŝon kaj aliajn muzikaĵojn. Sekvis alparoloj de la alilandaj ges-anoj. La festparoladon faris

Studienrat prof. Simon, kiu per elkoraj vortoj kuraĝigis la ĉeestantojn, daŭrigi la E.-laboron por plua evoluo de la laborista klaso.

Dimanĉe la 26. julio finis la olimpiado. Samtage okazis granda festmarŝado de la olimpiad-anoj (prks. 100.000) sur la bulevardoj kaj antaŭ la urbdomo. La esp.-sportistoj marŝis kun la anoj de E.-sekcio de „La Naturamikoj" kunportante multajn flagojn kaj transparenton, varbante tiel por E. ĉe la multnombraj rigardantoj.

La laboristaj ges-anoj en tiuj festotagoj grave akcelis la E.-movadon en Wien, same kiel ALLE-estraro, kiu eldonis specialan olimpiad-numeron de „Socialisto", menciante en ĝi ĉiujn sukcesojn de laborist-socialistaj partioj kaj sindikatoj, kiuj koncernas E.-on.

Samtempe okazis ankaŭ 1. internacia kunveno de laborist-filatelistoj. En la malferma kunveno prez. Simon salutis nome de ALLE kaj akcentis la valoron de E. por la filatelistoj kaj por Intern. Asocio de laborist-filatelistoj.

Post la olimpiado okazis „Internacia Socialista Kongreso". La delegito de la hispana socialista partio, deputito arkitekto Francisko Azorin el Cordova (membro de IEMW) parolis al la Wien-aj samideanoj en la laborista hejmo Wien-Ottakring pri „Rolo de la hispana proletariaro en la hispana respubliko".

(Laŭ raporto de E.-Soc. „Danubio")

---

**Wüster E.**, Dr. Ing.: Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik. Berlin, VDI-Verlag, 1931, 431 Seiten mit 4 Tafeln in Leinen Rm. 20.—, soeben erschienen. Eine ausführliche fachmännische Besprechung dieses hervorragenden Werkes erfolgt in der nächsten Nummer.

---

Loka E.-Societo Dresden de GEA festos la 25-an datrevenon de sia fondiĝo.

E.-Grupo Köln festos sian jubilean fondiĝfeston la 3. kaj 4. okt.

E.-Grupo Gohlis festos la 4. okt. sian 10-jaran ekzistadon.

Elkorajn gratulojn: IEMW, AEA, AE.

---

Artikolo: **„Wilhelm Exner und Esp."** de R. M. Frey en venonta numero.

---

## Admono.

Ĉe vojkruc' se vi staras,
Ho, gardu vin!
Kaj paŝon se vi faras,
Pripensu ĝin!
Loganta bril' paliĝas,
Se daŭras la logado;
Se celon vi atingas
Vi pentas pri l' irado! — —

(El germana lingvo de Piller tradukis A. Taussig).

**August Forel mortis.**

Li estis fama sociologo, psiĥologo kaj kuracisto, sed li ankaŭ jam antaŭ 25 jaroj efike propagandis por nia lingvo, kies socian signifon li, fervora socialisto, bone ekkonis. („Socialisto".)

## Gravaĵoj.

**Odessa Radjo-Centro**, Odessa, Lenina str. 17, USSR. Laŭ informoj de Ĉelo de Sovjetrespublika Esperantista Unio ĉe Odessa Radjo-Centro ĉi tiu baldaŭ komencos brodkasti superan E.-kurson sur ondo 450. Vidu la germanan tekston Postulu de Radjo-Centro enketon.

**Ljubljana**, 16 paĝa faldprospekto kun multkolora titolbildo, urb- kaj trafikplanoj kaj 13 bildoj. Mankas la citado de eldonanto, tradukinto kaj de la eldonjaro, kiuj datoj certe interesas kaj speciale la bibliografiston. Mendu senpage ĉe la oficiala vojaĝoficejo Putnik.

**Praha, ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka Respubliko**, bela 12 paĝa faldprospekto kun 9 bildoj, eldonita sub aŭspicioj de Turisma fako de UEA de „Ĉeĥoslovaka asocio esperantista", Praha VII, Socharska 333 kaj de ĝi senpage havebla.

**Sudokcidentgermana E.-Ligo**, prezid. Schönrich, Wiesbaden, okazigis sian ĉijaran ligotagon la 6, sept. en Bingen a. Rh.

**„Balkana Konkordo"**, n-ro 5-6, majo-junio, 24 pĝ., kun multaj bildoj. Aparta numero sv. fr. —.50. Adr.: Sofia, Poŝtenska kutija 233.

**„Verdaj Fajreroj"**, revuo monata, ekaperis en majo 1931, inkvarta, 16 pĝ., jarabono 3 Zl. 60. Mendu ĉe Akademia Esperantista Rondo, Warszawa, Nowy-Swiat 21.

**Nova gazeto:** Juna Samideano, monata, Kraków, ul. Lelewela 9, M. 2., aperis la unuan fojon dum XXIII. Jarabono sv. fr. 2.—. Aperas pole kaj E.-lingve.

---

**Elkoran kondolencon** al s-ano Mildschuh okaze de la morto de ŝia patrino.

---

**Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto** beginnen am 2. Nov., 8 Uhr früh, mit der schriftlichen Prüfung in der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt, Wien, I., Hegelgasse 14. Die mit 1 S gestempelten Gesuche sind bis 20. Okt. bei der Direktion der Prüfungskommission, Wien, I., Burgring 9 (Stadtschulrat), Zimmer 53, einzubringen.

## Aŭstria Esperanto-Asocio
Linz, Weissenwolfstr. 31

### Grava alvoko!

La imponaj sukcesoj de la lastaj Ĉe-kursoj en Berlin, kiujn partoprenis pli ol 1000 gelernantoj, instigas al imito. „Laborkomitato de Vienaj E.-Societoj", sekcio de AEA, rigardas kun ni sian plej urĝan taskon, intensivigi la E.-movadon en Wien per aranĝoj de tiaj kursoj.

La nepre necesaj grandstilaj preparoj bezonas garantian kapitalon de minimume 2000 ŝ. Por kolekti ĉi tiun sumon, ni invitis la samideanaron, garantii po 20 ŝ., pageblaj en partpagoj de 4 ŝ. dum 5 sinsekvaj monatoj. Proksimume 60 jam sin anoncis. Tiu ĉi alvoko espereble alportos la ankoraŭ mankantajn 40.

La Ĉe-kursoj en Berlin likvidiĝis kun granda monprofito krom la efektiva varbado al E. La ŝancoj en Wien estas almenaŭ la samaj. Ni estas certaj, ke tial la garantia sumo povos esti repagata tuj post fino de la kurso. La garantiantoj ĝuos por la vizito de la kurso specialajn rajtojn kaj ilia garantiata sumo estos plene alkalkulebla al la kurskotizo, kiu verŝajne estos 20 ŝ.

La garantia kapitalo ebligu al Laborkomitato tujan eklaboron, dissendon de informaj leteroj al ĉiuj lernejoj, institucioj kaj estraroj, vastan publikan propagandon en ĉiuj rondoj de la Wien-a loĝantaro per miloj da alvokoj, cirkuleroj ktp.

La tempo urĝas! Vi bone komprenas pri necesa, energia propagando. Pro tio ni esperas, ke vi subtenos la klopodojn de la Laborkomitato per tuja sinanonco kiel „garantianto" al: Laborkomitato de Vienaj Esp.-Societoj, Wien IX. Löblichg. 3.

Post unuigo de la por E. batalantoj ni paŝu nun al ofensivo!

La estraro de AEA: K. Wannek, prez., R. Ulbrich, afergv.

**Ĝustigo.** En raporto pri la festo en Salzburg estis eraro. Ne prof. Christanell sed prof. Scheirl surprizis per humorplenaj „Gstanzeln".

**E.-gr. Leoben:** Dankon por gazeteltranĉoj. Daŭrigu.

**E.-gr. Krems:** Dankon por gazeteltranĉoj. Daŭrigu klopodojn pri aperigo de informoj el nia gazetservo. Resto de membrokotizo alvenis.

**E.-gr. Steyr:** Gazeteltranĉoj alvenis, sed ne la avizita membrokotizo. Sendu raporton pri la kursoj.

**Graz, Salzburg, Innsbruck, Braunau:** Grupestroj! mankas viaj raportoj, ĉu la gazetoj publikas la informojn de nia gazetservo.

**D-ro Pfeffer, Wien:** AEA gratulas vin je via sukceso. Sendube estos efika la de vi kompilita 20-paĝa ilustrita kurso de E. por la granda leksikono.

**Reg. kons. Steiner:** Sinercan dankon por viaj sukcesaj klopodoj ĉe Rotary kaj registaro.

**Prof. Kirchner, Lienz:** Scherer-parolado povas okazi germanlingve, interesos ankaŭ neesperantistojn.

**Al la UEA-delegitoj aŭstriaj kaj izoluloj:** En Aŭstrio ekzistas en 62 lokaj delegitoj. El ĉi tiuj nur 17 estas anoj de AEA, kvankam la membrokotizo estas nur S 1.20 jare. Ankaŭ multaj izoluloj ne estas anoj de la landa asocio. Samkiel UEA ankaŭ la nacia landa organizo bezonas en kiel eble plej multaj lokoj kunlaborantojn. Pro tio ni dissendis multajn varbleterojn precipe al la UEA-del. kaj al izoluloj, kies adreso estis konata al ni. Ni petas ĉiujn, aliĝi al AEA kaj, se ili pro ia kaŭzo ne povas aliĝi, sciigi al ni sian pretecon je kunlaboro. Ni sendos al ili klarigojn pri efika, nenion kosta kunlaboro. Skribu tuj al ni.

**„Organiza referanto"** de AEA fariĝis R. Ĉech-Wien, kiu klopodas kompili adresaron de la tutaŭstria neŭtrala esperantistaro.

**„Gazetar-referanto"** de AEA fariĝis d-ro Pfeffer, kiu zorgos laŭ ebleco por gazetaferoj, flugfolioj ktp.

**Korespondadon** en Esp. komencis firmo Lutz & Co., Faltbootwerke „Zenith", Linz.

**Esperanto-Intervjuo ĉe Radio-Wien:** Ni per cirkuleroj petis, ke oni danku al Ravag pri la aranĝo. Ni esperas, ke oni plenumis nian peton, ĉar grava por venontaj klopodoj.

**Braunau am Inn:** La estraro de ĉi tiea ĝenerala ekspozcio (8.-16. VIII.) disponigis al AEA senpage vandon, sur kiu estis fiksataj grandaj afiŝoj kun propaganda teksto, flugfolioj, foirafiŝoj ktp. — La 16. VIII. partoprenis ges. el Braunau, Simbach kaj Mattighofen, la 3. distriktkunvenon (la antaŭaj estis en Mauerkirchen kaj Mattighofen). Attgm. vizito de la ekspozicio, pttgm. ekskurso al Simbach (ĉasista kabano).

**Linz:** La grupkunvenoj denove okazos vendrede je la 20 h en la gastejo Staatgut. — Privata duklasa komerca lernejo Stein envicigis E.-on en sian instruplanon kaj mencios tion en anoncoj. Instruos Mraz. 42 lernantoj. — La konsilantaro de la metiaj klerigaj lernejoj konsentis la aranĝon de E.-kurso sekve de la bonaj rezultoj de la lastjaraj kursoj. Pluajn kursojn malhelpas manko de mono.

**Mattighofen:** Depost mallonge elmontra kesteto servas kiel interligilo inter la s-anoj kaj propagandilo por la neesperantistoj. Vigla intereso por estontaj kursoj.

**Steyr.** En la komerca lernejo estas enkondukata E.-instruo.

**Wien: Laborkomitato de Vienaj Esp.-Societoj:** Por akcepto de al Krakow travojaĝantaj s-anoj funkciis en la vesperoj de 27.-31. julio komitato de Unuiĝo, Danubio kaj Ofichavantoj en la kunvenejo de Unuiĝo en Café Kolowratring. Ĝi povis saluti d-ron Patai-Budapest, dir. Mair-Innsbruck, la germanan mondvojaĝanton Fyrst, Saget-Elbeuf (Francujo), la i talan karavanon kun ĝia gvidanto prof. d-ro Canuto-Torino Rivier-Alĝerio, dir. de ICK Kreuz-Genevo, jugoslavajn s-anojn gvidatajn de Rotkviĉ-Zagreb. La komitato montris al la alilandanoj la urbon kaj Schönbrunn.

**Wien: E.-soc. „Danubio“:** La societo kunvenis ankaŭ dum la feriaj monatoj. La 13. VII. okazis „Parolata E.-gazeto“. Prez. Cech prelegis nekrologon pri prezidanto de Lingva Komitato Cart, Vasta parolis pri inventisto Stephenson, Hovorka kaj d-ro Pfeffer recitis poemojn. La 20. VII. prelegis f-ino Mantel memtradukajn novelojn. 3. VIII. Humora Vespero: Rakontitaj kaj prelegitaj spritaĵoj kaj anektotoj.

**Wien: E.-soc. „Danubio“** ŝanĝis sian ejon kaj kunvenos post 31. 8. en kafejo Eckherr, VII, Lerchenfelderstraße 23 ĉiun lundon de 20-22 h. Provizore okazos nur konversaciaj kunvenoj. La 17. VIII. raportis Klein kaj Mudrak pri XXIII-a; la 24. VIII. prelegis Minuska Mantel humoraĵon el la kongresnumero de Literatura Mondo.

---

**Ekskurso de Kat. E.-Unuiĝo en Wien.**

La 14. junio multnombra membraro de KEU veturis sub gvidado de prez. Chiba al Krems por viziti sian honorprezidanton P. Mestan kaj travivi en societo de la Krems-aj s-anoj belajn horojn.

En aparta vagono ili alvenis post bela veturado en Krems, kie ilin atentis la tiea grupo en la stacidomo. Prez. Stanke kaj OLGR. d-ro Salcher ilin salutis. D-ro Salcher kondukis ilin en la tre interesan templon kaj klarigis al ili tiun kaj la multajn vere interesajn vidindaĵojn de la antikva urbo Krems.

En Piarist-preĝejo P. Mestan celebris la sanktan meson kaj anoncis la Evangelion.

Poste en granda ĝardeno de P. P. piaristoj okazis fotografado. En granda salonego de la monaĥejo P. Mestan salutis la gastojn kaj transdonis la salutojn de episkopa moŝto de St. Pölten d-ro Memelauer kaj de abata moŝto de Göttweig P. d-ro Hartmann Strohsacker. Prez. Stanke salutis ĝoje la alvenintajn gastojn, por kiuj respondis prez. Chiba kortuŝite al honorprez. P. Mestan kaj prez. Stanke por la afabla invito.

Post komuna tagmanĝo oni veturis al Göttweig, kie ĉe la enirejo de la abatejo salutis P. Subprioro kaj kondukis ilin al la preĝejo, kie estis sankta beno. Sekvis mallonga prediko de vicprez. P. Kudrnovsky.

Post vizito de la abatejo kaj trezorejo komuna refreŝiĝo en la abata ĝardeno.

Antaŭ granda neesperantista publiko prez. Chiba dankis al la Krems-anoj kaj poste reg. kons. Steiner atentigis pri la graveco de Esperanto kiel kompreniĝ-, kaj repaciligo en Esp. kaj poste en germana lingvo, kiu trovis multan aplaŭdon ĉe la gastoj

Reveninte al Krems, elkora adiaŭo kaj reveturo en aparta vagono al Wien.

Grandan dankon meritas dir Schiebl, la „vojaĝmarŝalo“. (Ni petas pardonon, ke la raporto aperas nur nun. Red.)

**Ŝercangulo.**

Por unu kiso de Vi, plej bela, mi volas fari plej grandan heroecon.

Bone, edziĝu kun mi . . .

---

**Li:** Nun mi estas tiel riĉa, ke mi povas nutri du inojn.

**Ŝi:** Bone, mia patrino venos . . .

**Verlag Wallishausser'sche Buchhandlung, Wien, I., Lichtensteg 1.**

**Reichhaltiges Lager aller Esperantoliteratur**

**Im Verlag erschienen:**

| **Glück & Sós** | **Franz Zwach** | **Fritz Stengel** |
|---|---|---|
| Lehrbuch, 31.-35. Tausend | Poeziaĵoj de Schiller | E.-Sprechübungen, illustr. |
| S 2.— | S 1.20 | S 2.40 |


Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL